

ESPERANTISTA

REVUO POR ESPERANTO EN ĈEĤOSLOVAKIO

Eldonas Esperanto-Asocio en ĈSR, Praha XIX, Uralské nám. 9. — Redaktas dr. Stan. Kamarýt.

Ivan Blatný: Zpěv

Docela blízko u mne, zde v tomto pokoji
strýček Josef se učí esperanto a brnká na kytaru,
jen malý kousek odtud, docela blízko u mne, ve čtvrtém
rozměru,

docela blízko u mne a jednou nohou
a jednou nohou skoro ve třetím,
docela blízko u mne šeptá: Mi estas esperantisto! Parolu
esperante, Ivano!
Ivano!

Jste všichni v tomto bytě.
Docela blízko u mne mrtvý roznašeč z půjčovny obrázkových
časopisů otvírá právě dveře.

Docela blízko u mne babička bere obrázkový časopis.
Bylo to první den. Právě se předplatila. Docela blízko u mne.
Jste všichni v tomto bytě.

Mrtvý hudební skladatel, kterého milovala, se usmívá
z černého rámečku.
Docela blízko u mne smrt neustále přítomná kosí hudební
skladatele.

Docela blízko u mne esperantisté odcházejí v davech
do záhrobí...

Jste všichni v tomto bytě.
Strýček Josef se brání: Mi estas esperantisto!
Docela blízko u mne smrt ukazuje tiše na dveře.
A strýček Josef odchází váhavě do jídelny, docela blízko u mne.
Docela blízko u mne sestupuje po schodech.

Jste všichni v tomto bytě.
Prosím vás, dejte už jednou spravít tu starou singrovku!
Zašeptá někdo kdesi docela blízko u mne.

Docela blízko u mne,
jste všichni v tomto bytě.
Byla to sice kruhovka, ale staršího typu.
Jsme všichni v tomto bytě.
Jen strýček Josef právě vyšel do dvora.

(Kritický měsíčník, 1947 č. 1/2.)

Karolo Pič:

MELANKOLIO

Mi estas laca kaj mi ŝatus dormi Kaj nuboj grizaj sin malalte trenas
Neniu lumo lumas ie por mi La ĉirkaŭaĵo ekdormiĝe svenas

Neniu al mi ion belan diras Krepusko sin al kurbaĵ stratoj portas
Aŭtuno nur foliojn arbajn ŝiras La tago mute sur tegmentoj mortas

Kaj pluvo kiu sin sur ĉion rulas
Min malrapide onde dormen lulas

APUDA POEMO

Renomita ĉeĥa revuo por beletristiko kaj estetiko „Kritický měsíčník“ (Kritika monata revuo), redaktata de eminenta estetikisto Václav Černý, profesoro en Karlo-universitato, aperigis en sia unua numero tiujara ĉeĥan poemon de juna poeto Ivan Blatný, titolitan „Kanto“. Ni represas ĝin apude en originalo, ĉar ĝi aludas Esperanton kaj enhavas du frazojn esperantlingvajn „Mi estas esperantisto! Parolu esperante, Ivano! — Ivano!“ Traduki versforme tiun poemon estas malfacile, ĉar ĝi estas verkita en libera ritmo kaj senrime. Ĝi estas verkita per metodo surrealisma. Esperanto ankoraŭ ne estas elprovita por tiaj taskoj.

La apero de aludoj pri Esperanto kaj uzo de frazoj esperantlingvaj en altnivela poemo estas fakto tiom grava, ke ni trovas utile enmeti la poemon en nian revuon. La poemo pentras atmosferon de kvietita kunesto familia. Esperantlingva frazo estas uzita por pli intense senti la etoson de la situacio.

Jen proza traduko de komenco de la poemo:

„Tute proksime ĉe mi, tie ĉi en ĉi ĉambro — onklo Jozefo lernas Esperanton — kaj ludaĉas gitaron, — nur iomete de tie ĉi, tute proksime ĉe mi, en kvara dimensio, — tute proksime ĉe mi kaj per unu piedo — kaj per unu piedo preskaŭ en la tria — tute proksime ĉe mi li ilustras: Mi estas esperantisto! Parolu esperante, — Ivano! —

Ivano! — Vi estas ĉiuj en tiu ĉi loĝejo. — Tute proksime ĉe mi morta portisto el pruntejo de bildgazetoj ĵus malfermas la pordon. — Tute proksime ĉe mi avinjo prenas ilustritan gazeton. — Ĝi estis la unuan tagon. Si estas ĵus aboninta ĝin. Tute proksime ĉe mi. — Vi estas ĉiuj en tiu ĉi loĝejo.“ —

Ni rigardas enmeton de Esperantomotivo en tian poemon tre grava fakto por ni. Ni gratulu la poeton pro lia atento pri faktoj, kiuj meritas atenton, kvankam ili tute ne estas oficialaj nek estas taksataj gravaj.

La monato majo instigis nin dediĉi en tiu ĉi numero multe pli grandan amplekson al la poezio ol kutime.

LANDO INDA JE ADMIR'

(*Čechy krásné, Čechy mé*)

*Lando inda je admir',
mi rigardas kun sopir'
viajn montojn, kies bel'
fianĉiĝas kun ĉiel'.*

*Tiu lok' de ĉarma hel'
estas hejmo de anĝel',
kiun por la propra glor'
foje kreis la Sinjor'.*

*Bohemio, ankaŭ vi
estas kreitaĵ' de Di';
la anĝel' — jen instigant'
de ĉiama em' al kant'.*

*En la kantoj de l' popol',
klare montras sin la vol',
ke nin la anĝel' sen ĉes'
ŝirmu kontraŭ malsukces'.*

*Do ĝis mia lasta spir'
mi rigardos kun sopir'
ĉefajn montojn, kies bel'
fianĉiĝas kun ĉiel'.*

Libere tradukis Miloš Lukáš.

Karolo Piĉ:

GEORGINO

*Sub blua firmamento,
sub freŝa, varma vento,
sur griza voj' vi iras.*

*Mantelo via tremas,
vi herbon piedpremas;
printempa suno miras.*

*Kaj mi vin vane gardas
kaj vane vin rigardas
kaj vane post vi diras:*

*»Restu por mia ĝojo
momenton sur la vojo,
ĉar mi vin priadmiras!«*

*Sed vi min ne atentis,
vin mia voĉ' ne tentis,
vin fremda vir' altiris.*

*Kaj vi nur sub la vento
kaj sub la firmamento
plu paŝas kaj — foriras...*

Vortoj kaj esprimoj el milita kaj post- milita tempo

brannost podkopávati
brigáda pracovní
brutální zacházení
dobrovolní pracovníci
dodavatel zboží
dopravní nesnáze
družstvo

— stavební
— bytové
— konsumní
— výrobní

držitelé moci
dvouletka
dvouletý plán obnovy a vý-
stavby

internovati
intervenní fond
jednotná organizace
kapitulovati před někým
kapitulace
klíčový průmysl
koalice

koordinovati
kryt protiletický
kvalifikovaný dělník
lidštější podmínky
maskovaná letadla
menšina národnostní
ministrský předseda

mzda průměrná
náhradní odpočinek
národní podnik
nezaměstnaný
odboj

odborové hnutí
odhaduje se, že
odsun Němců
okupační pásma
okupovaná země
osazenstvo továrny
osnova zákona
padák
plánování státní
plocha osevu
pohraničí
pojištění

— sociální
— invalidní
— nemocenské
— starobní
— krupobitní

pojištěnec
politický vězeň
popravy hromadné
pracovní doba, její úprava
pracovní oděv

II.

subfosí defendovolon
labor-brigado
brutula traktado
laborvolontuloj
var-liveranto
transport-malfacilaĵoj
kooperativo

— domkonstrua
— loĝeja
— konsumna
— produkta

povo-tenantoj
dujara plano
la dujara plano de renovigo kaj
rekonstruo

internigi
intervenata fondado
unueca organizado
kapitulaci al iu
kapitulaco
baza industrio, »ŝlosil«
koalicio
kunordigi

ŝirmejo kontraŭbomba
kvalifikita laboristo
pli homindaj kondiĉoj
kamufilitaj avionoj
nacia malplimulto, minorito
ĉefministro, ĉefo de la registaro,
registara prezidanto

meza salajro
kompensa ripozo, ripoztago
nacia entrepreno
senlaborulo

rezista movado, r. laboro, r. batalo
sindikata movado
oni takse kalkulas, ke
forŝovo, forigo, foririgo de g.
okupad-regiono, -teritorio, -zono
okupita lando

personaro, salajruloj de la fabriko
leĝoprojekto, propono de leĝo pri
paraŝuto, falsŝirmilo
ŝtata planado

surfaco de semado
limregionoj
asekuro
sociala asekuro
invalid-asekuro
malsan-asekuro
vivo-asekuro
hajlo-asekuro

asekurito, asekurato
politika kaptito, malliberulo
amasaj ekzekutoj
labortempo, laborhoroj, ilia (ĝia)
reguligo
laborvesto

pracovní týden 48hodinový
 program vládní košický
 prokurátor
 pryčna
 předpoklad
 přídavek za hodiny přes čas
 přidělové řízení
 režim
 rozsah dopravy osobní
 — — — — — nákladní
 rukojmí bráti
 snížení cen životních potřeb
 spojenci
 spojenectví
 spojenecké armády
 správní aparát
 státní převrat
 stávka
 stávkokaz
 stíhati soudně, policejně
 svébytnost národní
 svoboda osobní
 — občanská
 — nábož. vyznání
 — tisková
 — projevu
 — shromažďovací
 — spolčovací
 účelná dopravní politika
 uchvatitel
 umělé hmoty
 uprchlík
 úřední místa
 úspory osobní
 — věčné
 ústavní zákon
 útok pumový, letecký
 válečný zločinec
 velmoci
 vyhlazená vesnice Lidice
 vymoženost revoluční
 vysídlení
 Wehrwolf
 zahraniční obchod
 zameškané hodiny
 zaměstnanec
 zaměstnavatel
 zhroutil hospodářské
 znárodnit
 znárodněný podnik

48-hora labora semajno
 la registara programo de Košice
 prokuroro
 kušbreto
 premiso
 krompago por superhoroj
 distribua procedo
 reĝimo
 la amplekso de la persona trafiko
 — — — — — var-trafiko
 preni garantiulojn
 malaltigo de prezoj de la vivbe-
 zonajoj
 aliancanoj
 alianco
 alianc(an)aj armeoj
 administra aparato
 ŝtata renverso
 striko
 strikrompanto
 persekuti tribunale, police
 nacia individueco
 liber(ec)oj persona
 — civitana
 — religia
 — presa
 — de pensenprimo
 — de kunvenado
 — de asociado
 ceĥava trafik-politiko
 uzurpanto
 artefaritaj, sintezaj materialoj
 rifuĝinto
 aŭtoritatoj
 ŝparo de personaro
 — de materialo
 konstitucia leĝo
 bombatako, flugatako
 militkrimulo
 grandpotencoj
 ekstermita vilaĝo Lidice
 revolucia akiraĵo
 ellandigo
 luphomo
 eksterlanda komerco
 ŝuldataj horoj
 dungito, salajrulo
 labordonanto
 ekonomia ruiniĝo
 naciigi
 naciigita entrepreno

Karolo Piĉ: Printempa invito

*Ne ploru, amatino;
 la frostoj iris for
 kaj majprintempa vino
 ekbolas en amfor'...*

*Ne ploru, jen burĝonoj,
 vespero kaj arom',
 jen birdkantetaj tonoj
 kaj ĝoj en ĉiu dom'...*

*Ne ploru, iru kun mi,
 ni sidos en la park'
 kaj vidos Lunon lumi
 kaj tremos kiel bark'...*

Doplňek k článku p. Bšk.

Malý obrázek, jak používají lidé ci-
 zích jazyků. Malou připomínku, jak
 používají cizí řeči lidé studovaní, kte-
 ří dokonce maturovali z toho kterého
 cizího jazyka.

Já, samouk, jsem se nerozpoko-
 veřel se amerického vojína odkud je
 a jak se mu v Praze líbí a pochubit
 se mu, že mám příbuzně v Clevelandu.

Studenti, stojící opodál, mne pozo-
 rovali. Jeden z nich se mi potom po-
 chlubil, „že dokonce maturoval z an-
 gličtiny“ a přece si netroufal „dát se
 do rozhovoru“ s tím vojínem, zatím
 co já si chtěl vyzkoušet, „jak by to
 s mou angličtinou dopadlo“.

Proč jsem se toho odvážil? Já, sa-
 mouk? Jsem esperantista a jako ta-
 kový jsem měl již více příležitosti
 rozmlouvat s cizinci v esperantu,
 kterému jsem se jako dělník učil také
 sám, a proto jsem ten ostych neznal.

Jaké z toho plyne poučení? My po-
 třebujeme lid se světovým rozhledem,
 a tento rozhled může všem bez roz-
 dílu rasy, náboženství a kabátu po-
 skytnouti jedině mezinárodní doroz-
 umivací jazyk, jakým je esperanto!

A odpověď skautova: Denně čtu
 o Festivalu mládeže. Sjedne prý se do
 Prahy 25.000 příslušníků různých ná-
 rodů, tedy pěkný Babylon. Jak se ta
 mládež bude dorozumívat, je všem
 funkcionářům lhostejno. Odpovídám:
 Uskutečnete aspoň takové mezinárod-
 ní dorozumění, jaké my, skauti-espe-
 rantisté, uskutečňujeme pomocí espe-
 ranta v táborech Skautské esperant-
 ské Ligy. Skaut-esperantista není žád-
 ná „putička“. Ať přijede kamkoliv,
 najde kamaráda esperantistu a ani
 pomalu nepozoruje, že je v cizí zemi;
 to byl můj zážitek při první návštěvě
 „ciziny“. O tom, co korun mi espe-
 ranto ušetřilo (kterých má každý děl-
 ník málo), to je kapitola sama pro
 sebe. Mám jen prostou odpověď: „Pře-
 svědčte se sami!“ Naučit se esperan-
 tu stojí věru za to! St. Lešinger.

Hm.

Karolo Piĉ:

EĈ LA STATUOJ ERIGOS...

*Sub tempa fluo ja eĉ statuo polviĝas
 Kaj ĝia ŝtono sub pluva sprono solviĝas*

*Do ne enŝtuon kiu kun pompo
 Staras nun pie tie aŭ tie sur tomo*

*Ĉar nun ja bele ĝin kisas hele sunbrilo
 Sed morgaŭ certe ĝi iĝos lerte argilo*

*Kaj apud ĝia kuŝos eĉ via korppolvo
 Kiun la sama mikso balzama vivsolvo*

T. Pump: Karel Hynek Mácha

Antaŭ 111 jaroj tragike mortis juna ĉeĥa poeto Karel Hynek Mácha (1810—1836), viro de eminenta talento, kiu alte elstaras super siaj samtempanoj. Lia revolucia pozo, la ombroplena filozofio de doloro kaj pereco, la spekulacioj pri la mizeroj de kosmo kaj homaro estis tute fremdaj al la atmosfero de la tiama ĉeĥa literaturo. Lia poemo *Majo* fariĝis fundamenta ŝtono de nova ĉeĥa poezio. Li trovis novan, sonorantan lingvon, plenan de sonharmonio kaj versa muziko, kun nekutimaj bildoj kaj metaforoj; li okupiĝis pri temoj de plej profundaj metafizikaj problemoj kaj kontrastigis en siaj versoj la ĉiovivigan amon kun la insistanta neevitebleco de la pereco.

Sub tiu ĉi vidpunkto ni nepre povas forgesi la naive simplan roman-konflikton de *Majo*: Rabisto Vilemo venĝis sian profanitan amatinon, nomatan Jarmila, sed murdante

sian deloginton, li sencie mortigis sian propran patron. Pro tio li estis kondamnita je morto kaj ekzekutita: Oni lin senkapigis kaj lian korpon enplektis en radon. La knabino, eksciinte de unu el liaj kompanianoj pri lia kondamno, dronigis sin en lago.

Cio ĉi ne estas la ĉefpunkto de la poemo, sed nur preteksto, ke Mácha povu per sia melodia lingvo eldiri la dolorojn de sia animo, kiun turmentis la pensoj pri van-teco de ĉio, la ĉagreno de perfidita amo, la sopiro pri la forpasinta juneco kaj duboj pri la postmorta vivo.

La poemo *Majo* estas ĉiam nove reeldonata kaj eĉ tradukata. Nun ekzistas tradukoj en ok eŭropaj lingvoj, al kiuj aliĝas nun la traduko esperanta. El tiu ni publikigas la unuan kanton de la poemo.

Karel Hynek Mácha:

MAJO

(Unua kanto.)

*Unua maja postvesper',
vespera maj', la amsezono ...
Aromis pinarbar-ozono,
al amo logis turta kver'.
Silenta musk' pri am' susuris,
amĝemojn ludis arb' floranta,
al roz', agrable odoranta,
la amon najtingalo juris.
Sub arbitaj' murmuris ondoj:
ĉagrenon kaŝis glata lag' —
ĝin ringis bord' per ĉirkaŭbrak';
kaj Sunoj de la Fremdaj Mondo
vagus sur blua firmamento
kiel flam-larmoj de amsento.
— Sur firmamenta grandioz'
ekaperinte la Mondsferoj
kiel en Templo de Eros'
amcelas sin ĝis metamorfoz'
je estingiĝantaj fajreroj,
kaj tiam kvazaŭ ama paro
kunvenas post la vojeraro. —
Rozardan lumon nun disverŝas
la ĉarmvizaĝa Lun' plensvela,
ho hele pala, pale hela,
kiel knabin', se knabon ŝi serĉas.
La Lun' en lago spegulumas
kaj memsopiro ĝin konsumas.
Pli fore blankaj domoj kuŝas:
kvazaŭ alpreme — brust' ĉe brust' —
ili proksimas en krepusk'
kaj ĉiam pli sin intertuŝas,
ĝis oni viddistingi ĉesas.
Eĉ arboj lude sin karesas
en ombra intermonta sin':
pinon betul', betulon pin' ...
Riverondar' ĉasludi volas — —*

*En amsezono plene bolas
ĉiu vivaj' per aminklin'.*

*Roza vesper'. Sur borda kliif'
ĉarma knabin' sub kverk' atendas:
al malproksima perspektiv'
trans lagon ŝi la vidon sendas.
Sub ŝiaj piedoj ultramar'
la lagon farbas, plu perdiĝas
kaj akvo pli kaj pli verdiĝas,
ĝis limas ĝin nur pala klar'.
Sur vaste vasta lagnivel'
ŝiaj okuloj lace glitas,
la vaste vasta lagnivel'
nur brilon de la steloj splitas.
Bela knabin' — anĝel' pekinta,
printempa Amarant' velkinta —
sur ŝiaj vangoj dormas ĉarmoj ...
Sed restis post la hor' fatala
gracia spur' de tristaj larmoj
sur lipoj, vidoj, frunto pala.*

*Tiel jam pasis tag' dudeka —
Pejzaĝon tuŝas songo eka.
Jam cedis lasta brulo fora
sur firmamento rozkolora
super lazura monto-ĉeno.
La trompino en la kri':
„Ne iras — ne plu venos li!“
ekĝemas el la brustopleno.
Koro fendiĝas sub pikil'.
Kaj al la ondmurmur' mistera
miksiĝas ploro malespera ...
Stelojn spegulas larma bril',
kiu sur vangoj brule drivas:
Ĉiu fajrer' sur vang' glacia*

*kiel falanta stel' finvivas . . .
Kaj velkas flor' sub tuŝo ĝia.*

*Jen saltis ŝi al rand' kaj paŭzas
kaj klinas sin al roka lim'.
Zelir' la blankan veston taŭzas,
ŝi celas al la malproksim'.
Nun ŝi la larmojn viŝi penas,
la vidon per la man' subtenas
kaj horizonton okulsondas:
Ĝis kie lagon mont' apudas,
fajreroj kun fajreroj ludas,
steloj kun steloj lude ondas.*

*Kiel se sub nubar' helmanka
kolombo flugas neĝopura,
au kiel se sur lag' lazura
lilio ekburĝonas blanka:
Tiel de transa bordlinio
rapide venas blanka io
sur lag' malhela. Temp' malgranda —
jam estas digna cikonio,
ne plu kolombo, nek lilio:
Neĝblankan velon vento puŝas.
Svelta remilo bluan tuŝas
kaj post ĝi restas longaj sulkoj.
La oraj nuboj, kiuj flamas
super la montaj kverkotrunkoj,
la ondo-fruntojn roz-ornamas.
„Vigla boato! Jam ĝi venas!
Li estas, li! La plum-ĉapel',
la floroj, flam-okul', mantel'!“
La ŝipon li sub roko ĉenas.*

*Al kruta rok' la viro paŝas
sur irvoĵeto facilkrure.
Kaj ŝia pala vang' purpure
farbiĝas. Kverka trunk' ŝin kaŝas.
Jen ŝi jubilas kaj renkonte
jam kuras, flugas — longa salt':
al boatist', lin brakumonte,
sur brusto kuŝas. — — Sed ve, halt!
„Ve al mi, ve!“ En Lun-radi'
aperis nun konata vango —*

*pro la teruro haltas sango —
„Kie Vilemo? Kie estas li?!“*

*„Vidu,“ la boatisto al ŝi flustras:
„Kie arbara dens' krepuskas,
blanketas turo. Lagprofundo
spegulas ĝin; sed pli sur fundo
lamp' rebriliĝas el fenestro-krad':
Tie Vilemo amuziĝas en si,
povante pace pri la fakto pensi,
ke morgaŭ ĉesos al li la vivad'.
Eksciis li l' hontaĵon fian,
nome, ke vi pli frue kulpis;
kaj li la viron, kiu vin uzurpis,
murdante — murdis patron sian.
Justec' rapidas pekon venĝi;
lin trafos morto fia, misa:
Ripozos li nur tiam en ĝi,
ĝis pendos kap' sur pint' palisa
— foje rozvanga, sed nun griza —
kaj rado rompos trunkon sen ĝi
kaj sveltajn membrojn. Vidu jen:
mort' de Terura Arbar-Suveren'.
Vin trafu, ĉar vi l' honton kaŭzis,
monda misfam' kaj mia malben'!“
Li turnis sin, la voĉo paŭzis.
Li pasis sur voĵet' submonte,
sian boaton malligonte . . .
La ŝip' jam flugas kiel cikonio,
jam ĝi similas al lilio
kaj malaperas horizonte.*

*Glatigis ondojn lag' helmanka
kaj ĉion tegis bluo brila.
En akvo palas vesto blanka . . .
Pejzaĝo flustras: „Ho Jarmila!“
Profunda lag': „Jarmila!! Jarmila!!!“*

*Estis majtempo, postvesper'.
Unua maj', la amsezon' . . .
Al amo logis turta kver':
„Jarmila! Jarmila!!
Jarmila!!!“*

El la ĉefa tradukis T. Pumpr.

KRONIKO ENLANDA

Pri plano de la lerneja komisiono raportis en la kongreso komisionestro T. Kilián: Ni ĉiuj konscias, ke la fina venko de Esperanto dependas de la ĝenerala enkonduko de Esperanto en la lernejojn de la tuta mondo. Mi opinias nian tempon promesplena por efektiviĝi tiun ĉi ideon,

kiu estas tiel malnova kiel la esperanta movado mem. Jen la kialo: La popoloj de la centra Eŭropo, t. e. 105 milionoj da homoj sen Italio kaj Germanio, uzis kaj uzas, ankaŭ ni ĉeĥoj, en siaj internaciaj interrilatoj la germanan kiel lingvon interkomprenigan. Dume ni ĉeĥoj la solaj en

Eŭropo forigis la germanan el niaj lernejoj, la ceteraj popoloj ne nur uzas daŭre la germanan kiel ni, sed daŭrigas ĝian instruadon en siaj lernejoj. Ni ĉejoj staras nun sur vojkruciĝo kaj devas decidiĝi: nia registaro aŭ reenkondukos la germanan en niajn lernejojn aŭ ĝi akceptos Esperanton kaj proponos ĝin al la ceteraj ŝtatoj de centra Eŭropo kiel interkomprenigan lingvon samtempe enkondukotan en ĉiujn lernejojn kiel devigan lingvon.

Tiun ĉi analizon de nia postmilita lingva situacio trovis ĝusta mia amiko parlamenta deputito D-ro Lad. Hobza, kaj li konsentis proponi al la parlamento jenan simplan planon, kies efektiviĝo tamen egalus al plenumiĝo de niaj jardeklaraj revoj: nia registaro proponu al la registaroj de la koncernaj mezgrandaj kaj malgrandaj ŝtatoj la samtempan enkondukon de Esperanto en la lernejojn. Se almenaŭ tri ŝtatoj respondos favore, konferenco de reprezentantoj de tiuj ĉi ŝtatoj fikso regularon, laŭ kiu la plano estus efektiviĝata.

Pri nia lingva situacio kaj pri nia plano mi parolis antaŭ pli ol unu jaro kun la prezidanto de nia parlamento s-ro Josef David. Liaj finaj vortoj estis: »Mi konsentas kun la plano kaj mi centprocente ĝin subtenos.«

La planon aprobis ankaŭ la tiama prezidanto s-ano d-ro Stanislav Kamarýt kaj interkonsente ni decidis, ke ni alpaŝos ĝian efektiviĝon, kiam la parlamento diskutos la preparatan novan lernejan leĝon, kio devis okazi jam antaŭ unu jaro kaj okazos supozeble dum la nuna printempo.

Nian planon mi tuj sciigis al IEL kaj al la esperantistaj eminentuloj en la koncernaj ŝtatoj, inter ili de Polio, Aŭstrio, Nederlando, Svedio k. a. petante iliajn subtenon, helpoj kaj konsilon. La samideanoj akceptis nian planon per aprobaj vortoj, sed realan subtenon promesis nur IEL, Nederlando kaj Aŭstrio. El Nederlando mi ricevis de s-ro ministro W. Drees, kiu estas malnova esperantisto, la promeson, ke li subtenos nin, se nia registaro oficiale proponos al la nederlanda registaro la enkondukon de Esperanto en la lernejojn.

IEL aprobanta nian planon kaj dezirante ĝin subteni, aranĝis la »Petskriban-kampanjon«, kiu, se la tutmonda esperantistaro estus sukcesinta kolekti 2—3 milionojn da subskriboj, povus iĝi la atutaso en nia parlamento kaj pli poste en la interdiplomata ludo pri la sorto de nia plano. Precipe gravaj ŝajnas al mi la subskriboj de niaj deputitoj kaj ministroj, ĉar kvankam la subskribo la subskribanton momente al nenio devigas kaj ligas, tamen li estonte ne povos kontraŭstari realan proponon, celantan la enkondukon de Esperanto en la lernejojn, se li antaŭ kelkaj monatoj teorie ĝin aprobis. Tiamaniere ĉiu samideano povas plej efike prepari la akcepton de nia propono en la parlamento. Mi sukcesis kolekti 14 subskribojn de la deputitoj. Vizitu la

Internacia Esperanto-Ligo.

Souhlasíte-li s následujícím prohlášením, raďte je podepsati a zaslati Theodor Kilian
Třebíč, Páňovní 318
Svazu esperantistů Československé republiky
v Praze 47.
jest Vám zelle na požádání další jeho výstky.

Prohlášení.

Dominám se, že otázka mezinárodního jazyka je věc tak vážná a praktická, že by ji měla Organizace spojených národů podrobiti ihned vážné úvaze.

Dominám se, že světový pomocný jazyk, který bude národní jazyky doplňovat, ne nahraďovat, je nutný aby usnadnil styky mezi národy a urychlil sociální pokrok.

Vzhledem na světové užívání esu jená, jediného z umělých jazyků, který se rozšířil v rozsahu hodném pozornosti, doufám, že Spojené národy pomohou rozšířování užívání tohoto jazyka všemi prostředky, na příklad vyučováním na školách, kde jsou pro to vhodní učitelé, používáním v turistice, mezinárodním obchodu a korespondenci.

Jméno (tiskem písmem) Th. Josef Beran

Povolání 2-21819Kaj, přílohy

Adresa Praha IV/56.

Město Praha Země Čechy

Datum 11/247 Podpis Th. Josef Beran

*Petskribo al UNO, subskribita de lia Eminenco
D-ro Josef Beran, ĉefepiskopo en Praha.*

deputitojn de via teritorio kaj ankaŭ vi sukcesos. Mi insiste petas, ke vi sciigu al mi la nomon de ĉiu subskribinta deputito.

La plej favorajn cirkonstancojn por nia plano mi trovis en Aŭstrio, kiel vidiĝas el respondoj de s-anoj d-ro Maximilian Fühning kaj R. M. Frey. Dume, kiel vi legis en la 4-a numero de Heroldo, d-ro Fühning paralele kaj publike eklaboris pri la efektiviĝo de nia plano, kion ni evitis fari, estante konvinkitaj, ke antaŭtempa publikigo de nia plano povas ĝin pli bremsi ol akceli. Ni esperantistoj faras unu grandan rondon familian kaj ni ĉiuj sincere kaj kore ĝojos pri ĉiu eventuala sukceso de Aŭstrio sur tiu ĉi kampo, kvazaŭ ĝi estus nia sukceso. Fakto estas, ke la aŭstria registaro traktas Esperanton plej favore el ĉiuj. Al tiu ĉi favora sinteno de sia registaro dankas la aŭstraj samideanoj siajn gravajn sukcesojn, kiuj tamen havas antaŭ ĉio intern-aŭstran karakteron. Sed nia plano celas la enkondukon de Esperanto en la lernejojn en amplekso internacia kaj mi timas, ke sur tiu ĉi

kampo la pozicio de Aŭstrio ne estas — pro ekonomiaj kaj politikaj kaŭzoj — tiel firma, kia ĝi devus esti ĉe iniciatanto de tiel grava entrepreno. Por eviti malagrablan miskomprenon: se Britlando aŭ Ruslando aŭ Usono volus preni sur sin la rolon de l'iniaciato, ni povus jam nun paroli pri nia venko.

Literatura komisiono (direktoro d-ro Tomáš Pumpr). Post la reviviĝo de la Asocio estis reviziita kaj kompletigita la malnova sliparo pri esperantaj tradukaĵoj el la ĉeĥa kaj slovakaj literaturoj. Pri la rezulto de ĉi tiu laboro aperis detala raporto en nia revuo Nr. 8/1946, p. 73 (la ĉefartikolo: »Česká a slovenská literatura v esperantu«, kiŭ aperis ankaŭ broŝurforme kiel 2-a n-ro de Informaj flugfolioj, por 2 Kĉs). Al neesperantistaj interesuloj estis el ĉi tiu sliparo donitaj informoj pri la tradukaĵoj el la verkoj de Březina, Bezruč kaj Havlíček. — La komisionestro korektis aŭ recenzis plurajn manuskriptojn tradukitajn aŭ originalajn, prozajn kaj versajn, entute pli ol 200 paĝojn, kaj kunlaboris kun la redakcio de la revuo kaj kun la radio-komisiono. — La planoj, ke la Asocio renove eldonu libron en Esperanto, ne povis ankoraŭ efektiviĝi. — La agendo de la Lit. kom. enhavas ĝis februaro 1947 entute 44 akceptitajn kaj 44 forsenditajn leterojn.

Komisiono por tradukoj (direktorino B. Vlčková) faris laŭ la ricevitaj sciigoj sekvan liston de ĉeĥaj verkoj tradukitaj aŭ tradukataj kaj disponeblaj en manuskriptoj:

Dr. Edv. Beneš: Nová slovanská politika (Jos. Vondroušek).

Karel Čapek: Povídky z jedné kapsy (Jan Zdvihal, lernejestro e. p.).

K. Havlíček Borovský: Křest sv. Vladimíra (dr. T. Pumpr).

Korejsová: Vítězství Vojty Záhoře (František Pytloun).

Fr. Langer: Grandhotel Nevada (Moraviaj E-pioniroj).

K. H. Mácha: Máj (dr. Tomáš Pumpr).

M. Majerová: Havířská balada (B. Vlčková).

Jan Vrba: Bažantnice (Moraviaj E-pioniroj).

Jan Vrba: Žnečka (Moraviaj E-pioniroj).

F. K. Zeman: Dva hlasy (Moraviaj E-pioniroj).

Virina movado kaj Esperanto en Ĉeĥoslovakio en 1946. Direktorino de nia koncerna komisiono s-ino F. Vítová estas membrino de la eksterlanda komisiono de la Konsilantaro de ĉeĥoslovakaj virinoj, tiamaniere ni senpere kontaktis kun la supera instanco de la virinmovado. Ligo de virinoj bulĝaraj per letero el 8-a de marto 1946, skribita bulĝare kun esperantlingva traduko petis nin, ke ni ekleiĝu kontakton inter ili kaj virinoj ĉeĥoslovakaj. La letero diras, ke ilia Ligo havas 250.000 membrinojn kaj ke en 12 urbokvartaloj en Sofia ĝi havas plurajn organizaĵojn. Nia komisionestrino transdonis la leteron kun detalaj informoj al estraro de la eksterlanda komisiono de la Konsilantaro de ĉs. virinoj.

Ĝia prezidantino s-ino Patzáková verkigis detalan raporton pri la laborprogramo de la Konsilantaro, dokumentitan de multaj tekstoj el ĝia organo. La tekstojn elserĉis ĝia redaktorino sinjorino Věra Urbanová. Al la bulĝara Ligo estis prezentitaj detalaj demandoj. La tuta dokumentaro estis tradukita de 11 membroj de la Esperantista Klubo en Praha kaj sendita Sofian. Bedaŭrinde la bulĝaraj virinoj ne respondis tiun ĉi leteron, kies kompilo estis grava laboro, meritanta respekton kaj intereson de ĉiu laborantino en la virina movado. La komisionestrino petis respondon per privata letero al s-ino Helena Balsamaĝi, sed sen rezulto. Pli poste venis el Plovdiv letero, petanta korespondadon inter ĉeĥaj kaj bulĝaraj virinoj. Ni respondis per mallonga ĉeĥa-esperanta letero, al kiu ankaŭ ne venis respondo. Sed post ioma tempo venis el Plovdiv esperantlingva demando, ĉu ni respondis al la virinoj el Plovdiv. Kvankam do la rezulto de nia klopodo uzi Esperanton por internacia kontakto en virina movado, vidigas ne sufiĉan komprenon ĉe la dua parto, ni tamen ne ĉesos en nia penado.

Ŝakistoj (komisionestro d-ro V. Faigl). Ĝis hodiaŭ ni sukcesis registri 21 adresojn de ŝakistoj-esperantistoj el tuta Ĉeĥoslovaka respubliko (16 el Bohemio kaj Moravio, 5 el Slovakio). Ĉeĥoslovakaj ŝakistoj partoprenas korespondturnirojn de Esp. fako de ICCA (International Correspondence Checs Association). En ĉiuj ĝis nun funkciantaj 7 grupoj ludas po 1—2 ĉeĥoslovakoj (sume 10 samideanoj). En tiuj 7 grupoj ludas sume 49 ŝakistoj el 14 landoj. La 1-an de aŭgusto 1946 komencis unua interŝtata korespondŝaka lukto Ĉeĥoslovakio—Nederlando, ludata sur 10 ŝaktabuloj. Ĝis nun finiĝis unu partio per nia gajno. Dua lukto, Ĉeĥoslovakio—Svedio, komencis en marto 1947. Ludas — kun unu ŝanĝo — la samaj kiel en la unua lukto. Ambaŭ luktoj estas oficiale aprobitaj de ĉs ŝakista unio (ÚJČŠ — Ústřední jednota československých šachistů). La komisionestro kunlaboras en la Esp. fako de ICCA (kies li estas turnirgvidanto) kaj en nia ÚJČŠ, kies li estas estrarano. E-fako de ICCA registris entute 120 adresojn de esp. ŝakistoj el 21 landoj. La raporto pri la komision-agado estis prezentita al ĉs. ministerio por instruado kaj klerigo.

Ministerio de instruado kaj klerigo respondis ankaŭ al petskriboj, senditaj al ĝi de la Labor-konferenco en Olomouc kaj de nia grupo en Tábor per dekretoj analogiaj al tiu, kiun ni enskribis sur paĝo 6.

Komerca ĉambro de Olomouc aperigas bibliotekon »Knižnice Obchodní a živnostenské komory v Olomouci«. La volumoj enhavis ĝis nun resumojn rusan, anglan kaj francan. Esp. socio en Olomouc komencis trakti kun la Komerca ĉambro, ke oni aldonu ankaŭ resumon esperantan kaj ĝi sukcesis. La kvina volumo de la biblioteko »Vývoj elektrisace východní a se-

verní Moravy» (Disvolvo de elektrizo en orienta kaj norda Moravio) de Ing. František Hnilica, aperinta en januaro, enhavas jam ankaŭ esperantan resumon. En la libro estas priskribita tre interese la plej bone elektrizita parto de nia respubliko. Broŝurita ĝi kostas Kčs 36.—. Mendu ĉe Obchodní a živnostenská komora v Olomouci (kun rimarko: laŭ la sciigo en la revuo »Esperantista«). Ĉiuj venontaj volumoj de la biblioteko ankaŭ enhavos esperantan resumon. La komerca ĉambro akceptu nian gratulon pro sia larĝvida decido.

Esperantista laborkonferenco en Pardubice. Esperantista klubo »Dro Schulhof« en Pardubice preparas por 21-a kaj 22-a de junio, okaze de la regiona ekspozicio de poŝtmarkoj, konferencon de orientbohemiaj esperantistoj kun partopreno de delegitoj el aliaj partoj de la respubliko. Provizora programo: La 21-an de junio malfermo de la konferenco per interkonatiĝa vespero kun amuza programo. La 22-an de junio antaŭtagmeze laborkonferenco, posttagmeze vizito al la poŝtmarka ekspozicio, kiu havas esperantan fakon. Sekvos laŭeble ekskurso al Kunětická hora. Interesiĝantoj anoncu vian partoprenon al klubo sekretario Fr. Nálevka, Pardubice, řed. pošt., kiu donos ĉiujn pliajn detalojn. La esperantistoj de Pardubice invitas kore la samideanojn, ke ili venu pasigi la du tagojn en amika rondo, partoprenante agrablan kaj utilan diskuton pri niaj problemoj.

Katolika agado de diocezo en Hradec Králové (str. Jiříkova 238) havas Esperanto-fakon jam depost oktobro 1946. La fakto mem signifas pozicion de nia lingvo en oficiala sfero sifaka.

Presitaj propagandiloj ĉeĥlingvaj ne aperas ankoraŭ multaj. Tial ni enskribu tie ĉi flugfolio, eldonitan de E. K. en Brno, kiu post citaĵo de Komenský argumentas por Esperanto en 8

LINGVO

Ŭkol 10.

Preklad tohoto textu raĉte zaslati do 15. ĉervna:

Mravní odpovědnost celého národa za činy některých jeho členů nelze vyjádřit nějakou krátkou formulkou. Vzpomeňme si, jak na počátku hitlerovského tažení proti lidskosti byl dělán všeobecně rozdíl mezi němečtívím a nacismem, mezi národem Goethovým a Schillerovým, Himmlerovým a Rosenbergovým. Poukazovalo se na dřívější miliony hlasů sociálně-demokratických a komunistických, a očekávalo se, že němečtí vojáci tohoto smýšlení nebudou bojovat s Hitlerem, ale že budou přebíhat na druhou stranu fronty. Nedělo se tak! Německý voják „poslouchal rozkazu“ a držel německou frontu až do jejího rozdrčení. Deserce byly ojedinělé, a „probuzené svědomí“ generálů, zajatých ve Stalingradu, promluvívalo do rozhlasu k stále bojujícím Němcům pozdě a marně. A tak veřejné mínění celého světa přestalo dělat rozdíl mezi nacismem a němečtívím: mravní odpovědnost za barbarství nacistů byla připsána celému německému národu: Kdo mlčí, souhlasí, a valná část německého národa nejen mlčela, ale i spolubojovala, a její spoluvina na všem, co druhá „německá válka“ přinesla, je nesporná. (Dr. Josef Macek, Naše doba, duben 1947.)

alineoj tre trafe. Tiu flugfolio estis varbilo por kursoj komenciĝantaj en februaro kaj estis almetitaj al la tagĵurnalo Ĉin en 10.000 ekzempl.

Ĉeĥa samideano Jaroslav Dittrich, vivanta depost multaj jaroj en Jugoslavio (nuna adreso: Uljanik, Jugosl.), neniom perdis de sia aktiveco malgraŭ la multaj frapoj, kiuj lin trafis en la multe suferinta Jugoslavio. Li sendas al ni longajn leterojn, plenajn da instigoj, kiujn ni laŭ nia ebleco utiligos. Nia amiko Dittrich estis dufoje arestita, lia domo kun tuta havaĵo forbruligita, ĉar oni trovis ĉe li kelkajn esp. gramatikojn. Kiu posedas la propagandajn »Korojn« de li eldonitajn, bonvolu sendi al li. De ni li bonvolu akcepti sinceran dankon kaj fratatan saluton!

Ferma bilanco de la Asociaj kontolibroj,

legita kaj aprobita en la kongreso 30. III. 1947. (Vidu paĝon 28!)

	Aktivoj	Pasivoj
1. Mono en la kaso	266,70	
2. Mono en la poŝta ŝparkaso	44.246,90	
3. Inventaro	7.998,—	
4. Diversaj entreprenoj	50,—	2.133,—
5. Presejo kaj afranko		14.678,70
6. Ekzamena komisiono		1.792,—
7. Superpaĝoj de Ekz. kom.		850,—
8. Librovendejo: Konto I		9.583,60
Konto II		1.653,90
9. Kotizoj por IEL		4.065,—
10. Kotizoj por UEA		240,—
11. Niaj kotizoj por 1947		1.240,—
12. Mono blokita en poŝta ŝparkaso	14.074,—	
13. Mono blokita en banklibreto	435,90	
14. Asocia kapitalo 31. XII. 1946		30.835,30
	<u>67.071,50</u>	<u>67.071,50</u>

Konto baza

Asocia kapitalo 31. XII. 1946	30.855,30	
Asocia kapitalo 1. I. 1946		17.488,80
Bilanca gajno		13.346,50
	<u>30.835,30</u>	<u>30.835,30</u>

Ŭkol 11.

Nederlanda Esperantisto (n-ro 2) uveĝeĵnuje pro zača-teĉniky tuto űlohu: Korektu la jenajn frazojn: 1. Pro tio li estas malsana, li morgaŭ ne iras al la lernejon. 2. Li kaj sia patro promenas en la ĝardeno. 3. Ĉu kial vi faris tion? 4. Li restis trankvila sidi en la momento, ke mi eniris la ĉambron. 5. Li diris al mi, ke li skribus la leteron kun kraĵono, sed li tamen skribis lin kun inko. 6. El la du fratoj Karlo povas kalkuli pli bona. 7. Li faris konvinkigan paroladon. 8. Ĉu vian amikon estas jam resaniĝita? 9. La tero turnas unu fojo ĉirkaŭ ĝia akso dum dudekvar horojn. 10. Atentu, por ke vi ne falas en la puto! 11. Ne trinku la teon tro varma! 12. Ĉu vi posedas multan da monoj? 13. Estis varma; la suno ŝajnis la tuta tago.

Opravte tyto věty a napište nám opravy na korespondenčním lístku. Stačí udat číslo věty a správný tvar. — Chcete-li však, můžete napsat i odůvodnění oprav, t. j. napište stručně, jak byste žákovi vysvětlili, v čem spočívá chyba. — Prosíme do 15. června!

Elias Tantalides (1818—1876):

KOTĚ

*Moje milá, napadlo tě
pozorovat někdy kotě,
pod stolečkem objeví-li
hadřík pro svou kratochvíli?*

*Všimla sis, jak naň se vrhá,
jak jej muchlá, jak jej trhá,
cloumá jím a za ním lítá,
tu jej pouští, tu zas chytá?*

*Všimla sis, jak hned jej hladi,
hned pak číhá na něj kradi,
skočí po něm nenadále —
a již zas jej smýká dále? —*

*Moje milá, napadlo tě,
ty že vlastně jsi to kotě,
já ten hadřík, s nímž si denně
pohráváš tak nezkroceně?*

*Co ses mě již nadráždila,
natrápila, nardousila!
Leckdy mě to k hněvu puďi —
pak se ve mně lítost budí.*

*Miláčku můj rozpustilý,
měj jen dál svou kratochvíli,
na kousky ať srdce moje
tvými drápký zedráno je!*

Z novořečtiny přeložil Miloš Lukáš.

NI LEGIS

Oficialaj vortoj. Ĝis nun la Esperantista Akademio oficialigis 6 vortlistojn aldona al la „Universala Vortaro“ kaj pro tio la nombro da vortoj oficialigitaj altiĝis de proksimume 2800 al proks. 4340. La lasta aldono (antaŭmilita) ampleksas nur malmultajn vortojn, nome: Angoro, Aperturo, Aplombo, Arbusto, Aŭguro, Aŭreolo, Bankiero, Gramofono, Grego, Honorario, Ingredienco, Koncesii, Konduktoro, Strebi, Susuri, Ŝrumpi, Vivisekcio, Vizio. — En la Plena Votaro tiuj vortoj estas presitaj ankoraŭ kun malgranda komenclitero. Vi do ŝanĝu tion, kaj aldonu (inter Vinko kaj Vintro) **V i n k t o**: Fera najlo kun larĝa kapo por kunigi ferajn pecojn marteale aŭ maŝine. (Nederlanda Esperantisto, Jan. 1947.)

Ĉeské překlady: úzkost; otvor; jistota ve vystupování; keř; předzvěst, znamení; svatozář; bankér; gramofon; stádo; honorář; přísada; udělití koncesii; průvodčí; snažiti se, usilovati o co, bažiti po čem; (strebi al iu celo; al malpieco strebas ilia animo; senti strebadon al poezio); ŝuměti, ŝustěti, ŝelestiti; scvrknouti se (ŝrumpas mortantaj folioj, maljunula haŭto); vivisekcce; viděni, zjevení, přízrak; nýt.

Nederlando. Estas rimarkinde, ke ĉe la granda publiko la interesiĝo pri nia celado estas malpli granda ol en la antaŭmilitaj jaroj, dum ke ĝuste ĉe oficialuloj kaj aŭto-

LA KATIDO

*Mia karulin', ĉu iam
katideton vidis vi jam,
kiel distre sub tableto
ludas ĝi per ĉifoneto?*

*Kiel ĝi sur ĝin sin ĵetas
kaj ĝin ĉifas kaj svingetas,
mordas ĝin, jen ĝin ellasas,
jen ĝin furioze ĉasas?*

*Kiel ĝi ĝin tuŝas mole,
ŝtelrigardas ĝin scivole,
saltas, ĝin kaptante skue,
kaj ĝin pele trenas plue? —*

*Estas vi la katideto
kaj mi mem la ĉifoneto,
ĉar vi ankaŭ, vin distrante,
ludas ja per mi konstante.*

*Vi dum horoj min provokas,
min turmentas kaj sufokas;
jen koleron mi eksentas,
jen humile tion pentas.*

*Petolema vi trezoro,
ludu nur per mia koro,
ĝis vi grade senkompate
ĝin disŝiros ungograte!*

El la novgreka: Miloš Lukáš.

ritatuloj, kiuj antaŭ la milito skeptike rilatis al nia movado, ni tre ofte renkontas seriozan interesigon pri la mondlingva problemo kaj simpation al nia celado (la internacia petskribo i. a. pruvigis tion). Pluraj eminentuloj kaj aŭtoritatuloj esprimis sin favore al Esperanto. (Nederlanda Esperantisto, marto 1947.)

Helena Esperantisto (en 23 Str. Rodou, Atinai, 8.) aperas regule dumonate. Ni konstatas, ke la redakcio preferas la nomon helenoj por sia nacio, anstataŭ grekoj. Ni miras, ke oni do ne insistas pri uzo de tiu nomo en la Jarlibro. — El la numero de novembro—decembro 1946 ni citu finon de artikolo de dro Anakreon Stamatiadis pri direktanta ideo: „El la suprediritaj argumentoj ni fine konkludas, ke en la senlima mondo, kiun ni povas koncepti, unu „direktanta ideo“ ŝajnas kunnaska al ĝi, kaj ĉiu homo aŭskultas sian propran animon por aŭdi certan eĥon de la mondakordo. Tio okazas, por ke li povu forgesi eĉ sian propran korpon kaj unu tagon senpente forlasi ĝin malantaŭen. Tiel li sukcesos miksi sian individuecon kun la universo kaj partopreni tiamaniere al la ĉiama anima senmorteco.“

Amerika Esperantisto, 114 West Street, New York 11, N. Y. Enhavo de unu numero: Esperanto — ponto inter la nacioj, de aŭstra ministro Frenzel; Esperanto en sci-

encaj publikaĵoj (originalaj freŝaj informoj); Babelo sur la insulo Long Island (sprite komentitaj intereseĝaj citaĵoj el usonaj gazetoj pri la lingva malfacilaĵoj ĉe UNO kaj pri la nesukcesantaj provoj forigi ilin); Esperanto aktiva (paĝo kun ok artikoloj, el kiuj sep signifas prespretajn novaĵojn por ĉiulandaj ĵurnaloj); Esperanto-klasoj en la lernejoj informas detale pri 24 lernejoj en Usono, kie estas nun instruata Esperanto. Ĉi tiujn anglalingvajn artikolojn sekvas en Esperanto: Tra la lingva konfuzo de la Unuigitaj nacioj, novaj observoj de dro W. Solzbacher; Lingva paĝo: The Esperanto Student kaj Esperanto-kroniko kun multaj novaj faktoj, krom oficialaj sciigoj de la Esperanto Asocio de Norda Ameriko. Fine plena paĝo de korespondemulaj adresoj. — Lego de tiu kajero signifas ĝojon por ĉiu esperantista koro kaj plej valoran instruon al ĉiu, kiu instruon serĉas. Ni ne troigas dirante, ke preskaŭ senŝanga traduko de la kompleta numero donus al ni bonegan broŝuron de granda propaganda valoro. Ni en malgranda kaj malriĉa Ĉeĥoslovakio povas nur deziri sukceson al la publikigita alvoko de Dan Ward Gibson, invitanta, ke iuj legantoj pagu po 10 dolaroj (500 Kčs) monate por faciligi la eldonon de Amerika Esperantisto. Regula aperado de tiu gazeto havas signifon por la tutmonda movado.

Espero katolika, el jan. 1947 povas esti nomita „ĉeĥoslovaka numero“. Sur la kovrilo estas bildo de Jesu-Infano de Praha, en la teksto estas artikolo de L. Dandová pri tiu statuo kaj pri legendoj ĉirkaŭ ĝi, poemoj de Jan Filip „Je nova jaro“ kaj „Kristnaskaj pensoj“, lia traduko de kristnaska kanto „Ni ekiros Betlehemon“ kun muziknotoj, bildo de altaro de l'Jesu-Infano, bildo de Ign. Weirich „Kristnaska paco“.

Pastro J. B. Kao, la konata ĉina esperantisto, kiu antaŭ milito travojaĝis Eŭropon, revenis hejmen, kiel li mem raportas en *Espero Katolika* el jan. 1947. Li forlasis Usonon la 12-an de aprilo 1946, atingis Ŝanhajon la 28-an de t. m. Pro malfacilaĵoj de la komunikado li devis resti en Ŝanhajo kaj Nankino du monatojn, kio ebligis al li konatiĝi kun elstaraj personoj de la nacio kaj de la religio. La 8-an de aŭgusto li alvenis en sian Mision de Fengsiang (Shensi). Li renkontis entuziasman kaj simpatian bonvenigon de sia episkopo, kolegoj kaj lokaj kristanoj. De la episkopo li ricevis povon administri la diocezon en kvalito de Vikario ĝenerala kaj Prokuroro, kio estas la plej alta ofico post tiu de l'episkopo. Lia ĉefa tasko estas reorganizi kaj subteni la Mision, kio postulas grandan laboremon kaj vigecon kaj krome multan monon. Ĝi estas nuntempe tre malfacila en Ĉinio, ĉar la vivokosto tre rapide tie kreskas pro senvaloriĝo de la mono, kio estas sekvo de la japana invado. La urbo Fengsiang estas tre malnova. Ĝia historio datumas de tri mil jaroj; pro tio ĝi posedas multajn valorajn memoraĵojn. Ĝia loĝantaro ne superas 30.000. Ĝia riĉeco estas terkulturo, alkoholo, teksaĵoj. La kultura nivelo de la loĝantaro ne estas tro alta. La diocezo estis fondita en 1932, sidejo de la episkopo estas en la urbo, sed ĝia teritorio etendiĝas en ses aliaj distriktoj kun kune unu milionu da loĝantoj. El ili estas 10.000 kristanoj. Tridek sacerdotoj laboras en tiu diocezo kaj ili konvertis dum la lastaj dekkvar jaroj 8 mil personojn al la katolika eklezio. Kolegoj de Kao preskaŭ ĉiuj estas junaj pastroj kaj povas vige labori. — Por nia movado li ĝis nun povis nenion fari, sed li klopodas enirigi Esperanton en la lokajn normalan kaj mezan lernejojn, iliaj estroj jam montris intereson kaj simpatian.

Pri preparoj por la Sokol-festo ni legas en la sveda „La espero“ el januaro 1947.

Neŭtraleco kontraŭ faŝismo ne povas ekzisti, diras „Internacia kulturo“ el oktobro 1946 kaj argumentas jene: Se nun en tiu ĉi historia, sortodecidiga epoko ni esperantistoj lasus nin dormigi per la frazoj pri „neŭtraleco absoluta“, neŭtraleco eĉ kontraŭ la faŝismo kaj la reakcio, neŭtraleco kontraŭ la bruligantoj de nova milito, kontraŭ ŝovinismo kaj nacia subpremado, se ni restus apatiaj kontraŭ la krimigoj de faŝista generalo Franco ekzemple, tio ja signifus, ke ni portas moralan respondecon kun li. Nia pozicio devas esti klara: ni estas neŭtralaĵ, senpartiaj kontraŭ partiaj konvinko, religio, raso, na-

cieco, sed ni ne povas esti kaj ne estas neŭtralaj kontraŭ Franco, Cankov kaj aliaj faŝistaj kaj reakciaj krimuloj.

La demando pri la eldono de fakterminaroj estas urĝa, diras s-ro Salex en tre bona artikolo de sveda „Espero“ (nov. 1946). La aperigon de fakaj terminaroj elementaj en IEL-ĵarlibroj oni ne povas taksu sufiĉe alte. Aperis:

1939 Fervoja terminaro, Rosher (200);

1940 Armea terminaro, Durrant (500);

1941 Aeronautika terminaro (400);

1942 Terminaro por infan-ludoj, Societo de britaj ĝeinstruistoj (250);

1943 Radio-terminaro, Venture (600);

1944 Muzika terminaro, Butler-Merrick (800);

1945 Filatela terminaro, Scott (300);

1946 Leĝa terminaro, Mildwurf (200).

Ĝn la tabelo estas indikitaj la aŭtoroj kaj proksimuma nombro de terminoj.

La Internacia elektroteknika vortaro de la Internacia Elektroteknika Komisiono, kiu ricevis en E-gazetaro grandan publikecon, aperis en 1938. La difinoj estas en la franca kaj angla, la terminoj estas francaj, anglaj, germanaj, hispanaj, italaj, esperantaj. La vortaro estas aranĝita laŭ tute faka ordo. Ĉiu termino (entute 2000) havas numeron kaj ĉar ekzistas alfabetaj registro en ĉiuj ses lingvoj la trovado de la vortoj estas tre facila. Preseraroj abundas, ankaŭ en la esperanta parto. El la esperantovortoj multaj nun certe bezonas prilaboron. Kompilante la vortaron oni ja devis inventi la plej multajn esperanto-esprimojn. La libro ne plu estas ricevebla ĉe la eldonintoj.

Al niaj legantoj ne estas konata Lumig-teknika vortaro, aperinta en Nederlando 1941. Ĝi enhavas 850 terminojn en la lingvoj nederlanda, germana, angla, franca, Esperanto, krome difinojn kaj notojn en la nederlanda. Ankaŭ tie ĉi la numeritaj terminoj sekvas laŭ faka ordo kaj apartaj alfabetaj listoj faciligas la serĉadon. Ĝin eldonis De Nederlandsche Stichting voor Verlichtingskunde Utrechtseweg 210. Arnhem.

S-ano Salex esprimas al IEL sinceran dankon pro la ĝisnunaj terminaroj kaj deziras al IEL, ke ĝi ne laciĝu sed daŭrigu persiste eldonadi ĉiujare novan elementan fakvortaron. Ni aldonus bedaŭron, ke la du lastaj (filatela kaj leĝa) ne aperis aparte ekster la ĵarlibro.

Pri neŭtraleco kaj „neŭtraleco“ ni legas tre saĝajn meditojn de dro Ivo Lapenna en Internacia kulturo (nov. 1946): La principo de plimulto estas nur unu formala metodo — kelkfoje ne tro perfekta — por palpi la pulson, por eltrovi la opinion de koncerna kolektivo: popolo, organizaĵo, socia grupiĝo aŭ eĉ rabista bando. Tiu metodo ne estas absolute kaj senkondiĉe demokrata, sed nur relativa, t. e. en kadro de certaj fundamentaj demokratiaj principoj, pri kiuj per nenia plimulto — nek per simpla nek per kvalifikita — oni povas decidi. Ekster tiu kadro ĝi estas maldemokrata... Esti neŭtrala rilate la politikajn partiojn — IEL povas kaj devas laŭ sia statuto. Pri tio ne temas. Sed esti neŭtrala rilate la krimon, signifas — en la konkreta okazo certe senintence — solidariĝi kun la krimulo, signifas fakte helpi lin kaj lian kriman agadon. Tial nomi la faŝismon „politika partio“ por pravigi la „neŭtralecon“ kaj aperigi tion en unu gazeto de demokrata organizaĵo en la jaro 1946 signifas — certe denove senintence — provoki la paciencon de ĉiuj, kiuj sur siaj dorsoj spertis la metodojn de tiu „politika partio“.

Kie restas SAT? demandas en titolo Aŭstria Esperanto-Revuo (dec. 1946) kaj riproĉas al ĝi, ke ĝi ne partoprenas en kunfandiĝo de UEA kaj IEL.

MORTIS

MUDro Albrecht Fiša, kolonelo de sanitara servado, mortis la 10-an de oktobro 1946 en Praha, okdekjara. Li estis malnova esperantisto, bone parolanta la lingvon, multe vojaĝinta en Ruslando kaj posedanta Esperanto-bibliotekon kun libroj el la fruaj jaroj de nia literaturo. Dum la maja revolucio sciis li, homo maljuna, sed soldato fervora, enigi sin en batalon kaj organizis en kelo helpfleĝojn, en kiu flegadis vunditojn dum kvin sinsekvaj tagoj kaj noktoj en Pankrác.

INFORMOJ

Unuiĝo de la neŭtrala movado estas jam efektiviĝinta. Ĝia nomo estas **Universala Esperanto-Asocio**, oni do reiras al la tradicia nomo, la fakto tre salutinda pro si mem kaj kiel pruvo, ke la traktintoj vidigis tre saĝan komprenon de la situacio. Ili ĉiuj akceptu de ni gratulon kaj dankon! Estas do de nun nur unu esperantista internacia organizaĵo (neŭtrala). Ĝi havos du oficejojn: centran oficejon por la administra laboro en Anglio kaj alian por dokumentado kaj servoj en Svisio. La gazeto ek de majo havos la nunan formaton de »**Esperanto internacia**« sed la titolon »**Esperanto**«. Kun la escepto de la oficiala parto ĝi estos redaktata de Hans Jakob en Genevo, presata en Anglio. Estos nur unu jarlibro, en du partoj kiel kutime, redaktata kaj eldonata en Anglio.

La komitato konsistos el: 1. anoj elektataj de la landaj asocioj aliĝintaj, kiel nun (por nia asocio ĝi estas s-o Jos. Vondroušek en Brno), 2. anoj elektataj de la delegitoj el internacia listo (po unu komitatano por ĉiu 250 delegitoj), 3. anoj, kiujn la komitatanoj, elektitaj sub 1. kaj 2. alektos ĝis kvarono de sia propra nombro. La balotado necesa okazos tre baldaŭ, por ke la komitato povu sin starigi antaŭ la Berna kongreso.

Unua tutslovaka Esperanto-Kongreso okazos en Turčiansky Svätý Martin la 14-an kaj 15-an de junio. Sabato n je la 15-a horo: Hiso de ŝtata kaj Esperanto-flagoj kaj malfermo de la kongreso. Je la 20-a horo: Esperanto-vespero en hotelo Slovan. D í m a n ĉ o n je la 8-a horo: Diservo kun esperantlingva prediko. Je la 10-a h.: Regula jarkunveno de la Slovaka Esperanto-Societo. Adreso por aliĝoj: D-ro L. Izák en Turč. Sv. Martin, Horvátova str.

Jugoslava kongreso de Esperanto okazos la 8-an de junio en Varaždin. La kongreskotizo estas 30.— Dinaroj. Eksterlandanoj ne pagas la kotizon. Informoj ĉe Ivan Košćec, Varaždin, Gajeva ul. 7.

Terkulturista organizaĵo internacia en kadro de IEL ekestas sub iniciato de francaj samideanoj. Ĝiaj taskoj estas: a) grupigi esperantistojn-terkulturistojn, agronomojn kaj interesatojn pri kampokulturo en ĉiuj landoj, teni iliajn adresojn je dispo de la membroj, kiuj deziras korespondi aŭ vojaĝi eksterlanden; b) starigi kampkulturan terminaron; c) informi siajn membrojn pere fakrubrikoj en E-gazetoj kaj eldoni propran fakgazeton, kiam estos sufiĉe da membroj. — Ĝis nun funkcias provizoraj sekretarioj en Francio, Nederlando, Finnlando, Britlando, Irlando, Kanado, Nov-Zelando kaj Ĉeĥoslovakio. Ĉeĥoslovakaj terkulturistoj kaj interesatoj bonvolu sin anonci ĉe s-ano Miroslav Srbek, Baštěk, p. Libeznice u Prahy.

Asocio de la bulgaraj filatelistaj societoj en Sofia estis fondita en jaro 1938. Ĝi unuigas ĉirkaŭ 50 societojn kaj 6000 membrojn en la tuta lando kaj eldonas gazeton „Poštenska marka“ (Poŝtmarko). Ĝi batalas por la prospero de la filatelo en Bulgario. La Asocio respondas esperantlingve ĉiun demandon de filatela karaktero kaj posedas adresojn de miloj da membroj, dezirantaj korespondadon kaj interŝanĝon kun eksterlandanoj. Adreso: Asocio de bulgaraj filatelistaj societoj en SOFIA, Strato Preslev 9, Bulgario.

INTERNACIA JUNULAR-KUNVENO EN SVEDIO

okazos inter la 12-a kaj 15-a de julio 1947 en la bela regiono de Kolmarden apud la urbo Norrköping. Kompletta kosto 15 svedaj kronoj. Estas anoncata riĉa programo, plejparte amuza. Aranjantoj: Sveda Esperanto-Federacio kaj Tutmonda Junular-Organizo. Informojn pri vojaĝebleco ktp. donas: S-o K. E. Andersson, Jursla 5, A b y, Svedio.

LIBROSERVO OBSTARÁ:

Th. Kilián: Esperanto. Uĉebnice a ĉítanka	Kĉs 39,—
Julie Šupichová: Esperanto. Mluvnice a uĉebnice	10,—
Ivan Sarafov: Legolibro	50,—
Wolker: Balado pri okuloj de hejtisto	5,20
Novák: Jan Amos Komenský	2,50
Welzel: Tridek jarojn en ora nordo (bind.)	41,—
Vrchlický: Nokto en Karlův Týn	6,60
Aŭgusto de Silva: Zola	20,—
Šupichová: Zajímáte se o esperanto?	6,—
Colinson: Esperanto a jeho kritikové	2,—
Svaz národů o esperantu	5,—
Na obranu esperanta	2,—
Esperanto, jazykové pojítka národů (4 strany)	kus 1,—
Dr. T. Pumpr: Česká a slovenská literatura v esperantu	2,—
Dopisní papíry s hvězdou a textem po 80 hal.	100 kusů 60,—
Dopisnice s hvězdou a textem,	kus —,20
Dopisnice s kresbou malířky Toyen (Printempa saluto)	kus —,70
Nálepky, kulaté, malé, sáček s 80 až 100 kusy	12,—

Poštovné účtuje se zvlášť.
Slovníky i šlosiloj jsou rozebrány. Přípravuje se nové vydání.
Objednávky adresujte panu Jar. Šustrovi v Praze I, Benediktská 11.

SOMERA ESPERANTO-LERNEJO EN DOKSY

aranĝos de la 19. VII.—2. VIII. 1947: 1. Kursojn por komencantoj kaj progresintoj, seminarion por aktivaj esperantistoj (funkciuloj, instruistoj de Espo) kaj tiuj, kiuj deziregas plene posedi Esperanton. - 2. Sociajn, amuzajn entreprenojn kaj ekskursojn por la vizitontoj al la Lernejo kaj esperantistaj somergastoj. ● Ek al Doksy ĉe lago de Mácha, ĉeĥa maro! Pasigu Vian someran libertempon kaj forpermeson en la nature rava kaj komforta somerrestadejo kaj ĝia amika esperantista medio! Rekomendu la partoprenon al amikoj de Esperanto, kiujn oni tie certe »verdigos.« La pasintjara kursaro en Doksy kontentigis la partoprenintojn, la ĉi-jara surprizos ĉiun per sia tre riĉa programo instrua kaj amuza. — Postulu tuj interesan tiurilatan prospekton kaj aliĝilon de sekretario K. Šolc, Mladá Boleslav I, n-ro 41. Aliĝu tuj, ĉar la nombro estas limigita! La aliĝojn oni akceptas nur ĝis la 30. VI. 1947. La prepara komitato.

**Pozor na čísla účtů Svazu esperantistů
ČSR u poštovní spořitelny!**

Čís. 9.602 název účtu: „Svaz esperantistů ČSR, Praha“ je určen jen k placení členských příspěvků, předplatného na svazový časopis „Esperantista“, příspěvků světové organizace esperantské.

Čís. 12.371 název účtu: „Svaz esperantistů ČSR - účet knihkupectví - Praha“. Na tento účet platte objednané knihy, zahraniční časopisy a jiné předměty, objednané u Svazu.

Můžete však platit na kterýkoliv z obou účtů, činíte-li platy pro obě kategorie (na př. za členský příspěvek a za objednané knihy) a chcete-li nám ušetřit námahu. V každém případě však přesně na složence označte, zač platíte. (Nyní není již třeba přilepit známku za sdělení!)

PŘÁTELE!

Propagandou pro naši vlast může býti též zaslání našeho časopisu cizozemskému esperantistovi. — Předplatte ho k tomu cíli svým zahraničním přátelům. — K tomu účelu účtujeme ročník toliko po 50.— Kčs. — Oznamte nám adresu, na niž máme časopis zasílati, na složence, již platíte! (Číslo 9.602, Svaz esperantistů Praha.)

Socikredito estas movado, fondita en Anglujo, kiu deklaras, ke ĝi taksas la kontentigon de la korpaj, mensaj kaj spiritaj bezonoj de ĉiu, kiel la unuan kaj plej ĝustan celon de la homaro. La Socikredito postulas: 1) La starigon de Nacia Kredito-Departemento, 2) La aplikon de la Preza diskonto, 3) La distribuon de Naciaj dividendoj. Sur malgranda esperantlingva folio ĝi donas kelkajn detalojn pri sia interesa ideo, sed ĝi donas ĉiun plian informon al ĉiu interesulo. Skribu al f-ino Muriel Stewart, sekretario de la Komitato por Socikredito, Gordon House, Carrington Street, Nottingham, Anglio.

Ni sendos al interesatoj senpage ampleksan prospekton aŭ por 10 Kčs la unuan kajeron de **LITERATURA MONDO**. Jara abono de „Literatura mondo“ estas Kčs 125.—. La sumon sendu al nia poŝtsparkasa konto 9 602! La mendojn adresu al nia administracio en Praha XIX, Uralské n. 9.

AMIKA INTERNACIA RENKONTO EN ANGERS
13—22-a de julio 1947 estas kunvokata de Angersaj esperantistoj. — Okazos paroladoj, vizitoj al vidindaĵoj, al vinberejo kaj al la marbordo. Kosto 150—200 frankojn potaĝe. La organizantoj klopodas atingi fervojan rabaton. Detalojn petu — aldonante respondkuponon — de f-ino Nouais, 28, boulevard Descazeux, Angers, Francio.

DIVIDO DE FUNKCIOJ DE LA ASOCIA KOMITATO

elirinta el la kongresa elekto okazis en la unua komitata kunveno la 1-an de aprilo je la 20-a horo en klubejo de E. K. en Praha. Samtempe estis restarigitaj komisionoj. La interesantoj pri difinita fako turnu sin senpere al la komisionestroj.

Prezidanto: Adolf Malík, Praha X, Karlova 5.
Vicprezidanto: Dr. Stan. Kamarýt, Chotěboř 853.
Vicprezidanto: Rud. Hromada, Praha VII, Sochařská 2.
Generala sekretario: Boh. Paleček, Praha II, Podskalská 49.
Sekretario: Jar. Mařík, Praha II, Krakovská 20.
Sekretario: Jan Valeš, Praha II, Na poříčí 42.
Kasistino: Hedva Nováková, Praha II, Na slupi 17.
Librotenisto: Jiří Hromada, Praha VII, Sochařská 2.
Komitatanoj: Vlado Jukl, Bratislava, Ul. 4. aprila 1.
Ant. Slanina, Praha XVI, Nádražní 13.
E. Tvarožek, Trenčín, Hurbanova 27.
J. Vondroušek, Brno, U botan. zahr. 31.
Vlad. Blažek, Olomouc, Dvořákova 36.
Fr. Kavan, Plzeň, Alešova 2.
T. Kilián, Třebíč, Příčná 318.
Fr. Pytloun, Hradec Králové, II, Riegrovo nám. 1010.

Vickomitatanoj:

Kontrola komisiono:

Vicmembroj de k. k.:

Komisionoj:

Estro de la oficejo: Fr. Slavík, Praha XIX, Uralské nám. 9.
Gazeto: Dr. Stan. Kamarýt (redakto), Fr. Slavík (administrato).

Gazetara servo:

Radio:

Radio en Ostrava:

Libroservo:

Literaturo:

Tradukoj:

Skoltoj:

Studentoj kaj junularo:

Ŝakistoj:

Sciencaj aferoj:

Lernejoj:

Ekzamenoj:

Librovendejo:

IEL-peranto:

UEA-peranto:

Dolfa Bartošík, Praha XVI, Na černém vrchu 31.

Adolf Malík.

Vlad. Slaný, Zdeněk Raška.

Jar. Šustr, Praha I, Benediktská 11.

Dr. Tomáš Pumpr, Praha XVIII, Bělohorská 1404.

Božena Vlčková, Kladno-Dubí, Stránská ul. 110.

Stan. Lešinger, Praha-Pankrác, Libušina 34; Fr. Buhr.

M. Jechout, Praha XVI, Nádražní 11.

Dr. Václav Faigl, Zlonice, nám. 6.

Dr. Augustín Pitlík, RNC. Jar. Hanuš, Kladno 1997.

Theodor Kilián.

Dr. Stan. Kamarýt, Dr. T. Pumpr.

Ota Ginz, Praha II, Stárkova 4.

Jar. Šustr.

Fr. Slavík.

Malmultekosta efika rimedo por ĉesi fumadon
(aŭ cigaredojn aŭ cigaron aŭ pipojn) estas mendebla ĉe s-ano Svačina Fran, delegito de IEL, en Lanžhot 663, Moravio.